

# EKO 2021

## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, de post 2013  
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj  
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-09 sendita el Budapeŝto la 1an de marto. Kontrolo el Svislando

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## 'Pacifiko' preta: Oceanio plus Nord-Ameriko

La projekto <Landa Parad'> eniras la jaron 2021 kun elano. Kiu ne konas la projekton, rigardu ĉe <aktivulo.net> sub <Landa Agado>. Tiu projekto estas la reta posteulo de la sekcio en la siatempa Jarlibro pri Landa Agado. Ĉar la reto ne konas hektarolimojn, la elektronika versio povas prezenti ege pli da informoj ol la tradicia presita Jarlibro, kie ĉiu kvadrata milimetro da papero alportis grandajn kostojn. <Landa Parad'> povas esti ilustrita por prezenti bildojn de Eo-centroj kaj oficejoj kaj kongresoj kune kun mapoj. Krome ĝi kunigas en unu landa prezento informojn, kiuj aperis en pli ol dek lokoj en la presita Jarlibro. Por pliaj informoj, vidu la artikolon pri landa agado en la marta numero de revuo *Esperanto*.

Tra januaro 2021, nova regiono estis inaŭgurita: Pacifiko kunigas Aŭstralion, Nov-Zelandon kaj Nord-Amerikon kaj akceptos informojn pri ajnaj pacifikaj insuloj kie esperantistoj ekagos. <Landa Parad'> estas bazita sur regionoj, ne kontinentoj; ja nur du el ĝiaj ses regionoj estas plenaj kontinentoj; pli gravas formi regionojn kun simila kultura kaj ekonomia unueco, kie la ebloj kaj obstakloj por nia movado pli similas. Ja <Landa parad'> tiel estas aktiva helpilo por niaj aktivuloj.

Servo subtenata de  
Universala  
Esperanto-Asocio  
kaj Internacia Ligo  
de Esperantistaj  
Instruistoj



Redaktoroj:  
Stefan MacGill kaj  
Mirejo Grosjean

**ENHAVO**

- Pacifiko en la Landa Parad'
- Greziljono printempe
- Ĉinaj premioj
- Nepala Pioniro

Necesas emfazi, ke la disdivido unikas al <Landa Parad'> kaj ne sekvas la tradiciajn dividojn, kiujn uzas UEA, kiu traktas la tutan Amerikon kune kaj traktas Oceanio kaj parto de la ja ege granda regiono 'Azio'. Nenio en la nova regiono malhelpas kunlaboron inter Oceanio kaj Azio, kaj inter la norda Ameriko kun Latinameriko – memoru la nordamerikajn kongresojn en Meksiko kaj la trilandajn kongresojn inter Nov-Zelando, Aŭstralio kaj Indonezio. Atentinda estas la starigo de Oceania sekcio de ILEI, fondita rezulte de la komuna kongreso (AU/NZ) en januaro 2020 kiu entenis la AMO-seminaron numero 62. Vidu ĝian okulfrapan emblemon:



Ĉar la rezulta dokumento sveltas, ni alkroĉas ĝin. Tion ni ne faros por la pli korpulenta latinamerika dokumento, nun en aktiva preparo – la enketiloj disiris, kaj kelkaj respondoj jam alvenis.

SMG

## Greziljono printempe

La viruso daŭre malhelpas nian kutiman vivon, sed ŝajne la vakcinoj liberigos nin post 1-2 monatoj. Kun tiu espero, Greziljono preparas sian sekvan staĝon PRINTEMPAS de la 16a ĝis 24a de aprilo, kun intensivaj kursoj en 4 niveloj kaj kun ekzamenoj. Vidu detalojn en tiu paĝo: [gresillon.org/printempo](http://gresillon.org/printempo)

Bv. jam aliĝi, eĉ en la nuna situacio malcerta. Ni ne enkasigos vian antaŭpagon. Se fizika studperiodo ne povos okazi, niaj instruistoj okazigos retkursaro kiel en 2020.

La sekva evento estos nia korusa-multaktiveca staĝo de la 28-a de aprilo ĝis la 2-a de majo: [gresillon.org/koruso](http://gresillon.org/koruso). Aliĝoj en : [gresillon.org/aligho](http://gresillon.org/aligho)

Jannick Huet, Greziljono

## Monpremioj por lernantoj en Ĉinio

Je la 13-a de januaro okazis en Ĉinujo la premio-cereminio de la stipendio Weilun. Tiu solenaĵo havis lokon en la bazlernejo Baiyangshujie, situanta en la urbo Taiyuan, kiu troviĝas en la provinco Shanxi, orienta regiono de tiu lando. La direktoroj transdonis atestilojn kaj monpremiojn al la 56 gajnintoj de la premio Verda Stelo kaj al la 16 de la premio Verda Semo.



Entute oni disdonis 40 mil juanojn, dividitajn inter instruistoj kaj studentoj. Tiu monsumo valoras proksimume 5 mil eŭrojn. La stipendio, financata de profesoro Li Weilun, el Pekina Lingva kaj Kultura Universitato, estiĝis en decembro 2019. Ĝia celo estas subteni la lernadon kaj disvastigadon de Esperanto en tiu eduka institucio.

## Nepala pioniro forpasis

Mi havas malbonan novaĵon rilate al forpaso de nepala Esperantisto pro la kovida malsano. Unua kinoartisto de Nepala Filmo, kunfondinto de NEspA, delegito de UEA kaj malnova esperantisto S-ro Baikunta Man Maskey forpasis pro la koronaviruso en oktobro 2020, la unua en Nepalo. Li estis 83 jaraĝa. Li eklernis Esperanton en 1960 kun Simo Milejovic kaj bone regis la lingvon. Li estis ano de Katmandua Esperanta klubo tiam. Poste li ludis gravan rolon en la fondo de NEspA en 1990. Li multe agis por Esperanto-movado en 1990-aj jaroj. Krom Esperanto li montris sian majstron kiel kinoartisto en pli ol dekduoj da filmoj. Lia morta korpo estis kremaciita sub la superrigado da la Nepala Armeo sen ĉeestado de familiaoj. Ni perdis intiman amikon; la familiaoj havu paciencon toleri tiun grandegan perdon.

Bharat Kumar Ghimire  
Ĝenerala Sekretario de NEspA

## Hungara pioniro forpasis

**BENCZIK Vilmos** (naskiĝis en [1945](#), esperantistiĝis en [1959](#), forpasis en 2021) estis hungara profesoro en altlerneja fakultato de la universitato ELTE en Budapeŝto. Li estis redaktanto de [Hungara Vivo](#), ekde 1979 kaj inter 1986 kaj 2002 prezidanto de la juĝkomisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA. Benczik kunlaboris en [Norda Prismo](#) kaj verkis recenzojn en multaj revuoj. En 1979 li publikigis *Libro de Romanoj*, en 1980 *Studoj pri la Esperanta Literaturo* (vidu la bildon) kaj en 1983 [Hungara Antologio](#), krom tradukoj el la hungara, recenzoj, eseoj, tradukoj en pluraj revuoj.<sup>[1]</sup> Ekde 2016 [honora membro de UEA](#).



En 1983 Benczik aperigis ĉe la eldonojo Corvina Kiadó la volumon *Hungara Antologio*. En 2001 elektita li estis membro de la [Akademio de Esperanto](#).

===== vortoj: 680 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2020. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.